NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
JANUARO 1995



FELIĈAN 1995

## ZAMENHOFA BANKEDO

45 esperantistoj kaj simpatianoj kunmanĝis en decembro por festi la datreveno de la forpaso de D-ro Zamenhof. La vic-prezidanto de UEA, Ulrich Lins, ankaŭ partoprenis profitante sia restado en Madrido. Kiel kutime la mebroj de la koruso "Verda Stelo" kantis dum la bankedo. Ĉiuj rememoris al Augusto kaj lia familio kiuj kutime ĉeestas la feston bedaŭrinde tio-ĉi jaro ili estas malproksime, en Slovakio, kvamkan estas en la koro de ĉiuj.

## KORUSO VERDA STELO

La ĵurnalo de Guadalajara "Nueva Alcarria" mencias speciale la partopreno de la esperanta koruso kiel unu el la plej konstanta kokursantoj en la "Fiesta de las Migas". Antaŭ unu jaro la kultura asocio de Jadraque (GU), donis memor-pladon al Madrida Esperanto-Liceo por sia 10-jara partopreno en la konkurso, lastatempe dank'al la koruso kiu ĉiu jare vojaĝas al Jadraque.

**★ ★ ★ NE FORGESU, 30-AN DE JANUARO ESTAS ASEMBLEO DE MEL ★ ★ ★**
**UNUA ALVOKO JE LA 18,30 HORO, DUA JE LA 19,00**

## CUENTA DE EXPLOTACIÓN DE ESPERANTO-LICEO DE MADRID 1994

| GASTOS | | INGRESOS | |
|---|---|---|---|
| Alquiler | 366.551 | Cuotas socios | 112.899 |
| Luz | 20.082 | C. colaboradores [1] | 210.000 |
| Teléfono | 17.164 | Loteria Navidad 94 | 200.580 |
| Revistas | 20.320 | Intereses [2] | 137.942 |
| Cuotas | 7.000 | Libro Eo fenómeno | 132.058 |
| Nia Voĉo | 15.000 | Venta de varios | 17.176 |
| Correo | 11.210 | Ingresos extra [3] | 10.071 |
| Lotería | 11.000 | | |
| Gastos extra [4] | 12.000 | | |
| Pérdidas extra [5] | 2.000 | | |
| Correo | 11.210 | | |
| **TOTAL GASTOS** | **482.627** | **TOTAL INGRESOS** | **820.726** |

**RESULTADO EL EJERCICIO (beneficio) 338.099 PTA**

Saldo en c/c B. Atlántico a 31-12-1994 506.912 PTA

---

1.- Coro "Verda Stelo"

2.- Depósito a plazo de 2 millones

3.- Donativos y otros.

4.- Comida UK-Valencia e invitación Ulrich Lins dia Zamehof.

5.- Robo

## HISPANIO

José González, delegito de HEF en Extremadura, organizis oficilan bazan kurson ene de la programo de "Universidad Polpular del Ayuntamiento de Badajoz", la gelernantoj estas universitanoj, dum la pasintaj jaroj, atingis 600, la plej parto profesiaj instruistoj. Sed, José demandas: Kial malaperas post la kurso?. Respondo: Ĉe MEL, Lupe ĉiam parolas pri plibonigi la "post-venda servo".

En Segovia, Cesar aktivas la movadon: Ofte sendas artikolon al regiona ĵurnaloj kun adresoj de MEL, HEF kaj koresponda kurso de Malago. Kvin librovendejoj havas esperantaj libroj en montro-fenestroj. Ankaŭ informis pri la nomo "Villa esperanto" kiu aperis en ne-uzita fervoj-haltejo apud Navacerrada. Kiu skribis tion?. Nova kurso komencis en Juna Restadejo "Emperador Teodosio" kaj daŭrigas la kurso por maljunoj en Centro de strato Real.

Manolo Parra, kiu ĝis nun loĝis en Segovio, translokiĝis al Madrido, lia bona esperanto-nivelo kaj labor-kapablo sendube estos profita por HEF kaj MEL, la du esperantaj centro en Madrido al kiuj apartenas Manolo.

## *HEF ANGULO* *(Ne oficiale)*

*Je la komenco de decembro okazis en la sidejo de MEL estrarkunveno. Telefone la redakcio de Nia Voĉo petis resumon de la protokolo por sendi kune kun la numero de januaro (Boletín ne numeros ĝis marto) bedaŭrinde ĝis nun ni ne ricevis.*

## ESPERANTA NUPTA FESTO

Fernando Moral kaj Maritza Graziani kiuj konatiĝis pere de esperanto e MEL geedziĝis la pasintan novembro. DUM VIVAN FELIĈON!!

## ESPIRITISTAJ MADRIDANOJ

En la programo de la "Federación Espírita Española", estas la Departamento de Esperanto, gvidata de MEL-ano Fernando Moral Albo, kun ĉiamaj kursoj de la lingvo internacia.

## MANGADA

Hazarde, dum la Zamenhofa bankedo, Ulrich Lins, kiu preparas libron pri ĝeneralo Mangada, konatiĝis al Lucrecia San Antonio al kiu Mangada instruis esperanton ĉe Ateneo de Madrid. Ŝi pruntedonis al Ulrich diversaj materialoj (fotografaĵoj, letreroj, ktp.) kiujn havas en ŝia arĥivo.

## HISPANA ESPERANTO-VORTARO

Fernando de Diego jam finis la unuan fazon de sia laboro pri grandega vortaro. DUm unu monato Antonio Valén helpis lin en Venezuelo. La teksto jam estas preta por korektado kaj komentarioj petitaj al diversaj elstaraj esperantistoj inter ili J.Camacho kaj M. Fernández

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°**

Marde/ĵaŭde, ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. fumkcias HEF-CO (Rodríguez San Oedro 13-3°-7).Aliaj tagoj kaj horoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

En Centro Cultural "Maestro Alonso" (Ventas) merkrede je la 18,30 h okazas baza kurso de esperanto.

Prelegoj dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.

13-an de februaro. "La poeto Adriano del Valle kiel tuta artisto". L.Ojer

20-an februaro. "Malsupreniĝi maŭren". C. Suárez

13-an marto. "La Zamnehofa reformo pri supersignoj". J. Navareño

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal


HdeE
N-ro15
94-11-16

*Ami kinon:*

# *Buŝa sekso*

**Originala titolo:** ***Sexo oral***
**(Hispanujo, 1994)**
**(Kolora, 87 min.)**
**Reĝisoro: Chus Gutiérrez**

Diras ĵurnalisma regulo, ke aktoro ne rajtas verki recenzon pri filmo, en kiu li mem aktoras. Kial do mi faru tion nun, kontraŭregule? Simple tial, ke mi emas. Male, plej multaj legantoj de KONTAKTO neniam aŭdus pri *Buŝa sekso*, kvankam povas okazi, ke post unu aŭ du jaroj projekcios ĝin kelktage ia landa filmoteko aŭ urba kinoklubo. Ĉiel ajn mi aperas sur la ekrano dum nur tri aŭ kvar minutoj, cetere senpage.


Gardeno de delicoj (detalo) de J. Bosch

Kiel sugestas la vortluda titolo, *Buŝa sekso* konsistas el fragmentoj de intervjuoj kun 55 diversaĝaj personoj pri ĉi ties seksa vivo, simile al la fama *Sekso, mensogoj kaj vidbendoj* (*Sex, lies and videotapes*, Steven Soderbergh, Usono, 1989), sed nefikcie. Malgraŭ tio en Madrido ĝi spekteblas en kinejo por normalaj filmoj. La plimulto el la intervjuitoj aĝas inter 25 kaj 40 jarojn, sed pli ol deko estas emeritoj.

Chus Gutiérrez, kiu verkis la skripton kaj reĝisoris la filmon kun la helpo de la aktorino Icíar Bollaín, demandis la intervjuatojn pri jenaj temoj: unua seksa sperto en la infanaĝo; unua amora sperto; seksaj fantazioj; rilato inter amo kaj sekso; opinio pri masturbado, malfideleco kaj pornografio ktp. Ne ĉiuj respondis pri ĉio same longe, sincere aŭ senĝene. Kelkaj parolis pli amuze, kelkaj iom blufe, aliaj fole aŭ drole... Entute la filmo prezentas interesan bildon kvazaŭ dokumentan pri la seksa vivo de nuntempaj hispanoj. Kvankam ĝi neniel ambicias aŭ pretendas kompletecon aŭ profundecon, mi rekomendas ĝian spektadon al ĉiu ajn ĉefe tial, ke ĝi prezentas kernan temon vigle, distre kaj sentabue.

La reĝisorino filmis ankaŭ la filmadon mem de la intervjuoj, tiel ke la publiko iel sentas sin kamerao, samtempe demandante sin mense pri la antaŭaj demandoj. Krome ne eblas ne senti diversgradan aktorecon en la intervjuatoj: la fakto, ke iu akceptas sidi kaj paroli antaŭ kamerao, lampoj ktp dum pli ol duonhoro tutcerte iel modifas la teniĝon de la respondanto.

La muntado de kohera filmo el tiom da materialo certe ne estas facila tasko, kaj la rezulto povintus esti tute alia laŭ la kriterioj de elekto kaj ordo. Chus Gutiérrez sukcesis, laŭ mia opinio, krei verkon interesan, pensigan kaj spritan.

Ne havus sencon transskribi ĉi tie la diversajn dirojn. Mi tamen atentigos pri la fakto, ke la reĝisorino konscie ignoris la temon aidoso. Laŭ ŝi aidoso estas malsano, kaj la filmo temas ne pri malsanoj, sed pri sekso. Mi trovas ĉi tiun decidon aplaŭdinda, ĉefe ĉar ofte papistoj kaj similuloj emas prezenti kune sekson kaj krimojn kiel kaŭzon de ĉiaj problemoj, manipule kaj hipokrite.

*Georgo Kamaĉo, Hispanujo*

**Reinhard Selten**

## Esperantisto ricevis la Nobel-premion!

**Komuniko de la germana inform-agentejo Dpa, de la 11-a de oktobro, sciigis la tutlandan gazetaron, ke Prof-ro Reinhard Selten ricevis la Nobel-premion por Ekonomio. La komuniko klarigis jam en la titolo, ke la premiito parolas ankaŭ Esperanton.**

**Fakte, Prof-ro Selten kaj la edzino Elisabeth estas malnovaj aktivaj esperantistoj, membroj de Germana Esperanto-Asocio kaj Dumvivaj Membroj de UEA. En 1982 li verkis en Esperanto, kune kun Jonathan Pool el Usono "Ĉu mi lernu Esperanton?" (enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj). La verko aperis kiel dokumento de AIS-San Marino.**

**La Nobel-premiito, filo de librokomercisto, naskiĝis en 1930, studis matematikon kaj diplomiĝis en 1957 ĉe la Frankfurta Universitato, kie li deĵoris ĝis 1967 kiel help-profesoro . En 1968 li instruis, kiel gast-profesoro, en la universitato de Berkeley (Kalifornio, Usono).**

**Inter 1969 kaj hodiaŭ, Selten instruis kiel ordinara profesoro ĉe la Libera Universitato en Berlino kaj ĉe la universitatoj de Bielefeld kaj Bonn. Lia specialiĝo estas la matematik-rilataj fakoj, oligoteorio, eksperimenta ekonomi-esploro kaj scienca lud-teorio.**

**Prof. Selten, kiu ricevis la titolon de honora doktoro de la universitatoj de Bielefeld kaj Frankfurto membriĝas en multnombraj sciencaj akademioj kaj ekonometriaj societoj kaj estas honora membro de la Usona Akademio de Arto kaj Sciencoj.**

**La tutmonda esperantistaro kun fiero gratulas al la Nobel-premiito!**

"Esperanto-10/94"
Honora membro de UEA

Ada FIGHIERA-SIKORSKA (maldekstra foto) naskiĝis la 26-an de januaro 1929 en Pollando. En 1940 ŝia familio estis deportita en Sovetunion, de kie ŝia vojo iris tra Irano kaj Libano fine al Britio, antaŭ ol ŝi povis reveni al sia patrolando en 1948. (Ŝiaj rememoroj pri tiu tempo, *De tajgo al minaretoj*, aperis Esperante en 1991.) En Pollando ŝi studis polan filologion kaj laboris en eldonejo.

Eklerninte Esperanton en 1956 kun Julio Baghy en Varsovio, ŝi tuj ekaktivis movade: ŝi laboris en la gazetara servo de la Varsovia UK (1959) kaj, ekde la sama jaro, en la unua stabo de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio. En 1960 sekvis edziniĝo al Giancarlo Fighiera, tiam konstanta kongresa sekretario de UEA, kun kiu ŝi transloĝiĝis al Britio por helpi en la preparlaboroj de la UK en Harrogate (1961). En 1962 komenciĝis ŝia vera vivoverko: ŝi fariĝis redaktoro kaj eldonanto de *Heroldo de Esperanto*. Dum 32 jaroj ŝi realigis jam pli ol 500 numerojn de tiu populara gazeto



# Esperanto en radio

## Radioelsendoj en Esperanto
## Kompleta listo laŭ la stato en oktobro 1994

| Tagoj | Tempo (UTC) | Stacio | Ĉefa celregiono, frekvencoj (kHz) |
|---|---|---|---|
| ĉiutage | 03.30-04.00 | R. Bandeirantes | Brazilo/cetera Ameriko: 11925 |
| dimanĉe | 04.05-04.30 | R. Aŭstrio | Eŭropo: 6155 13730<br>Proksima Oriento: 15410 |
| sabate | 06.30-07.00 | Litova Radio | Eŭropo: 9710 (nur lastan sabaton de monato) |
| dimanĉe | 07.00-07.30 | R. Havano | Nord-Ameriko/Pacifiko: 6060 |
| ĉiutage | 11.00-11.25 | R. Pekino | Orienta Azio: 6955 9480 |
| ĉiutage | 13.00-13.25 | R. Pekino | Suda Azio: 11650 11840 |
| dimanĉe | 13.05-13.30 | R. Aŭstrio | Eŭropo/Afriko: 6155 9870 13730<br>Azio: 15450 |
| ĉiutage | 14.30-14.55* | Pola R. | Eŭropo: 6135 7145<br>9525 9540 11815 |
| dimanĉe | 15.00-15.30 | R. Havano | Ameriko/Karibio: 11760 |
| dimanĉe | 18.30-19.00 | R. Havano | Afriko/Mediteraneo: 17760 |
| sabate | 20.00-20.20 | RAI, Romo | Eŭropo: 7275 9755 11800 |
| ĉiutage | 20.00-20.25 | R. Pekino | Eŭropo: 7405 7470 9965 |
| dimanĉe | 20.20-20.29* | R. Vatikano | Eŭropo: 527 1530 (mezondo);<br>3945 5882<br>Afriko/Proksima Oriento: 7305 |
| merkrede | 20.20-20.34* | R. Vatikano | 1611 (mezondo); 6185 7365 |
| ĵaŭde | 21.15-21.30* | Estona Radio | Norda Eŭropo: 5925 |
| ĉiutage | 21.30-21.55* | Pola R. | Eŭropo: 5995 6135 |
| dimanĉe | 22.00-22.30 | R. Havano | Eŭropo/Mediteraneo: 17760 |
| merkrede | 22.15-22.30* | R. Sarajevo | Eŭropo: 612 (mezondo); 6980 |
| ĉiutage | 22.30-22.55 | R. Pekino | Suda Ameriko: 9480 11515 |
| dimanĉe | 23.30-24.00 | R. Havano | Ameriko: 11760 11970 13660 |

* ekde 1995-03-26 unu UTC-horon pli frue

Mez-Eŭropa (Vintra) Tempo = Universala Tempo (UTC) + 1 horo
Mez-Eŭropa Somera Tempo = Universala Tempo (UTC) + 2 horoj

**Nombro de Esperantaj elsendoj internaciaj en semajno: 62-63**
**Entuta elsendotempo en semajno: 26 horoj 28 minutoj**

Elsendoj pere de satelito: *Pola Radio* (dimanĉe 11.30-11.55): Eutelsat II-F3, 16 gradoj de la orienta longitudo, frekv. 11080 GHz, polarizado H(orizontala), aŭdofrekv. 8,28 MHz; *Radio Vatikano* (dimanĉe): Eutelsat II-F1, 13 gradoj de la orienta long., frekv. 11554 GHz (MBC), polarizado H, aŭdofrekv. 7,74 MHz

### Kelkaj lokaj radioelsendoj

| | |
|---|---|
| **Aŭstralio:** | Radio 3.ZZZ 92,3 FM (Etna Radio), P.O. Box 1106, Collingwood, Victoria 3066 |
| **Brazilo:** | Radio Rio de Janeiro, Brazila Spiritisma Federacio, Arda Passos 30, BR-20051-000 Rio de Janeiro |
| **Francio:** | Radio Esperanto, 145 rue Amelot, FR-75011 Paris |
| **Hispanio:** | Radio Klara, 102,6 FM, F.N. Clemente, Calixto III, 36, ES-46008 València |
| **Hungario:** | Esperanto Radio, HU-1800 Budapest |
| **Italio:** | Radio Radicale, Via Principe Amedeo 2, IT-00185 Roma |
| **Nov-Zelando:** | Access Radio, Wellington (David Ryan, P.O.B. 3867 Wellington) |

*Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de tiu ĉi rubriko: s-ro Josef Lechermeier, Waldeysenstr. 19/311, DE-85057 Ingolstadt, Germanio. Se eblas, bonvolu almeti reafrankon.*

### Korespondadresoj kaj ĝeneralaj informoj

Radio AŬSTRIO Internacia: AT-1136 Wien ( = Vieno), Aŭstrio (tel. +43/1/87878-3636; fakso +43/1/87878-3630).

Radio BANDEIRANTES: San-Paŭlo, Brazilo.

ESTONA Radio: EE-200100 Tallinn, Estonio.

Radio HAVANO: Apartado 62-40, La Habana, Kubo (telekso 51 1344 rhc cu). Dimanĉe trifoje al Ameriko kaj dufoje al Mediteraneo kaj Eŭropo. En Eŭropo kelkfoje bone kaptebla.

LITOVA Radio, Vilno: Radiocentras, A.D. 1792, LT-2019 Vilnius, Litovio. Lastan sabaton de ĉiu monato.

Radio PEKINO: 2 Fuxingmenwai Avenue, Beijing 100866, Popola Resp. Ĉinio. Ĉiutage 4-foje al diversaj mondregionoj; la elsendo por Eŭropo okazas ekde la 20-a horo laŭ UTC.

POLA Radio, Varsovio: Skrytka pocztowa 46, PL-00950 Warszawa, Pollando (tel. +48/22/459-358, +48/22/459-337; fakso +48/22/444-123). Disaŭdigas ĉiutage 2 programojn, ĉefe por eŭropaj aŭskultantoj.

RADIOTELEVISIONE ITALIANA (RAI): C.P. 320, IT-00100 Roma, Italio. Sabate 20-minuta programo por Eŭropo.

Radio SARAJEVO: fakso +387/71/455-141. Korespondaĵoj al Internacia Kultura Servo, Amruševa 5, pk. 499, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

Radio VATIKANO: IT-00120 Città del Vaticano (fakso +39/6/698 3844). Dufoje semajne por aŭskultantoj en Eŭropo kaj en la Proksima Oriento.